Registered at G.P.O., Melbourne, for transmission by post as a newspaper.






(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:
63 SCOTT ST., MOONEE PONDS, W4, VICTORIA.
Abono (por 10 numeroj):
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj——Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.
Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.
Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.
Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo—12 linioj: 3 ŝilingoj.
Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj -monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 165 (15th Year). MELBOURNE (AŬSTRALIO). 12 OKTOBRO, 1934.

# MORITURI TE SALUTANT.

## La Nuna Numero Estas La Finlasta! La Suda Kruco Mortis.

### THE "SUDA" PASSES.

With this number "La Suda Kruco," founded in July, 1920, ceases publication through insufficient support.

Since April, 1929, when Mr. P. Hudson ceased to guide the gazette, your editor has given continual thought and labor to the matter of establishing the paper as a self-supporting concern.

In October of 1932 he joined forces with Mr. R. Rawson and his colleagues, in the hope that by a bold forward move in doubling the paper he might draw nearer this goal. In spite of the best endeavor of all concerned there was failure to hold the new position.

The ceasing of the S.K., it must be made clear, is due to peculiarly local conditions, and in no way reflects the state of the Esperanto movement generally. Esperanto is more and more influencing the life and thought of Europe, and, through Europe, the world.

One day there may displace the present "gaseous invertebrate" a real A.E.A., a body firmly linking by a generously produced official organ, the Esperantists of six States and N.Z. Then, and not till then, will it be practicable to issue an Esperanto gazette in this peculiar-conditioned country without constant anxiety as to its regular and sustained publication. Should such an association experience, as we to-day, times of nation-wide difficulty, any deficit on the year would be met by a small levy on each member. The organ of the Australian Esperanto movement in that day would depend no longer on the undivided responsibility and limited means of a few persons. It would rest on the willing shoulders of, I dare to write, thousands of aim-conscious workers throughout this hemisphere.

There may be those to whom the payment of advance subscription has entailed certain sacrifice. To these we would suggest that they approach us, if they so desire, to the end that we refund their money.

"La Suda Kruco," while it lived, lived usefully; it will not have died in vain if, for those that shall follow on, its thirteen years' experience of battle may serve as a light on the dark, winding way that leads surely to our goal.

R. BANHAM, Editor.

### AL NIAJ ALILANDAJ KOLEGOJ!

Jen la lasta numero! Pro monmanko ni devis ĉesigi aperon de nia amata organo. Akceptu esprimon de nia danko pro via ĉiame afabla kaj komplezema sinteno al ni. Denove dankon!

R. Banham, 63 Scott Str., Moonee Ponds, W4, Victoria, Australia (konstanta adreso).

### VARIA.

El la Oficiala Dokumentaro de I.C.K.:—

"Ni ne ricevis raporton pri la aktiveco de la Aŭstralazia Esperantista Asocio, sed rekte informis nin per La Suda Kruco pri la agado de niaj tieaj samideanoj."

Skribas s-ro Wm. Bailey, L.A., pri la interpunkcio:—

"Mi opinias, ke la Zamenhofa sistemo estas pli bona gvidilo, ol la naciaj lingvoj. Kiam Z. eldonis sian Lingvan Respondon pri tiu temo, ni ne havis multe da Zamenhofa materialo, sed nun ni havas grandan kvanton. Anstataŭ konstrui dubesignifajn frazojn kaj krei arbitrajn diferencigojn per nova sistemo de interpunkcio, skribu klarsignife:

Mi ne amas bruemajn (bruantajn) infanojn (konforme al la modela frazo 'Mi ne amas obstinajn homojn,' Ekzercaro par. 10, 7). Por la dua senco vi povas uzi: 'Mi ne amas tiujn bruemajn (bruantajn) infanojn.'

En kelkaj detaloj la Zamenhofa sistemo ne estas tute konsekvenca, sed almenaŭ pri la komo antaŭ rilataj pronomoj lia metodo estas konstatebla sen malfacileco." (16 Julio, 1934.)

### EL POLA PLUMO.

#### Esperanto—la plej taŭga traduklingvo.

Kontraŭuloj de esperanto (la plej danĝeraj—konantaj ĝin iom) riproĉas ofte la internacian lingvon, esti malkapabla speguli tradukе lingvajn belaĵojn de originala literaturo. Ili estas nur tiam pravaj, kiam iliaj riproĉparoloj koncernas verkojn skribitajn en popolaj idiomoj. Ekz. monumentaj noveloj de

**Amo de Toojuuroo kaj Du Aliaj Teatraĵoj:** de Kan Kikuci. Trad. el la Japana de J. Ŝimomura. Eld. Literatura Mondo. Agento ĉe ni. 88-paĝa, prezo 2ŝ.

Kompare kun la sendube konsiderinda disvastiĝo de E-o inter la Japanoj, la pure literatura E-a eldonitaĵo ĝis nun veninta el ilia lando relative mizeras. Indas mencion nur Deklaracio kaj la unua vol. de Ora Masko, krom unu-du mallongaj pecoj. Sed nun eliras per niaj nelacigeblaj hungaraj amikoj tri teatraĵoj, el kiu la meza, "Pli bone ol venĝi," estas elstare la plej frapa. La unua, "Amo de T." rakontas, al la recenzanto, la kruelan indiferenton de fama aktoro de amaĵistaj roloj, kiu malvarmsange vidas mortigi sin la edzinon de alia, post tio ke li uzis ŝin amindume por pliperfektigi la propran arton.

La tria, "La Miraklo," spegulas la putriĝon de la tradicia Budaismo. La cinika lingvaĵo de la nekredanta Ŝukan kaj lia moka alkraĉo al la sankta idolo rememorigas nin pri Juĝistoj 6,25-32; I Reĝoj, 18 ĉap. 27 v.; el kio ni vidas la antikvajn Izraelidojn antaŭ 2,000 jaroj atingi evoluŝtupon nun alvenatan de la ĝis nun tradicie pensantaj Japanoj.

La meza, jen la perlo. Forte drameca, ĝi komenciĝas per murdo de mastro fare de servisto Iĉikuroo. Tiun ĉi instigadas al krimo lia megero-kunulino (1) Oĵumi. Ili fuĝas en montojn, kaj tie perrabe vivas. Tiam la sceno ŝanĝiĝas. Iĉikuroo konvertiĝas al alta idealo de porhomara servo; penas forviŝi la ĉefkrimon, laborante permane fosegi tunelon tra rokomonto, kun celo savi vivojn ĝis tiam perdatajn pro neceso transpasi abismon per danĝera svingponto. Trovas lin Jicunosuke, la venĝon-serĉanta filo de la murdito. La naturon de la krizo kiu sekvas el ĉi renkonto de du flamaj animoj, kaj la intenson de la streĉo kiun sentas la leganto dum li finas la katenantan verkon, ni prefere ne malkovras.

Ĉu Kikuĉi studis Ŝekspiron? La malbonspirita Oĵumi, puŝanta la manon de Iĉikuroo en ankoraŭ pluan sangon, forte pensigas pri Lady Macbeth; la sceno en la kaverno, kiam la juste kolera filo piedfingre alpaŝas la preĝantan Iĉikuroo, povus esti inspirita de la simila en Hamleto, kiam la reĝido detenas la punpretan manon (Sc. 3, akto 3).

Rimarkoj: "T., rigardas Okaji'n kuŝantan tie plorante (plorantan); aktuala sperto por ludi rolon (efektiva sperto... du-folda (du-falda); kompatinde (bedaŭrinde) li estis rabita; nenio helpas (ĝi ne povas esti evitata); lasi lin morti senutile (? senhelpe); alies (tre utila formo, sed nefundamenta); 82, mezo (meso). Neniaj notoj pri kriptomeria (Crytomeria Japonica); katamito, karadrio, paŭlovnia, kariko, ĵelio (A. jelly). Kiel oni traduku la libron en nacian lingvon, ne sciante kion signifas tiaj enigmaĵoj?

(1) Nomo de unu el la tri Furioj en greka mitologio; diableca viriinaĉo.

---

**Skizo pri Filozofio de la Homa Digno,** de Paul Gille, prof-o ĉe la Belgia Inst. por Altaj Studoj. Trad. el la Franca de E. Lanti. Eld. S.A.T., 67 avenue Gambetta, Parizo 20. Prezo 3 ŝil.; paĝ. 148.

Ĉu la homoj, laŭ Paskal, havas la dignon de kaŭzeco, la povon iniciati, aŭ ĉu ili estas sklavoj, automatoj movataj de la blindaj fortoj de la ekonomio? Diras Lanti en la antaŭparolo: "La verkaro de Marks kaj Engels enhavas multon ĝustan laŭ ekonomia vidpunkto. Sed aliflanke estas tute vere, ke ju pli mi enprofundiĝas en la studado de marksisma literaturo, des pli mi konvinkiĝas, ke la ekonomiaj faktoroj ne sufiĉas por klarigi ĉiujn okazintaĵojn, por komprenigi la sintenon de l'homoj en diversaj cirkonstancoj de l'vivo."

Ĉar diris Marks, resumante sian kredon pri la demando: "La produktomaniero de l'materiala vivo kondiĉas, in globo (L. maldetale), la socian, politikan kaj intelektan procezon de l'vivo. Ne la konscio de l'homoj determinas ilian staton, sed male ilia socia stato determinas ilian konscion."

Tiun aserton Gille rebatas. Citante Reclus, li kontraŭmetas, ke la ideoj faras la socion kaj regas la mondon. Kompreneble, ke la ideoj ricevas la premon de la ekonomiaj kondiĉoj. Kaj tiu premo estas ordinare tia, ke oni povas diri, ke, en sia tuto, la kolektiva vivo dependas de ĝi. Ĝi dependas de la ekonomiaj kondicoj, sed ĝi ne fluas el ili kiel el sia fonto. Ĉi tiu lasta restas, malgraŭ la diro de Engels, "en la kapo de la homoj." Kaj ni povas vidi sur ĉiuj kampoj de l'vivo, ke la relativa sendependeco de la ideoj, rilate al la ekonomiaj kondicoj, montras siajn efikojn.

Pludiras Gille: La religia sento certe estas tute alia afero, ol la "ekonomia bezono renversita" kaj serĉanta en imaga transmondo kontentigojn, kiuj mankas al ĝi sur ĉi tiu tero. Ĉu estas permeseble aserti, ke la predikado de Jesuo el Nazareto aŭ tiu de la Budao estis nur la rezulto de teknika revolucio, de "metamorfozo de l'produktado kaj interŝanĝado"? Absurda estas la perekonomia klarigo pri la religioj kaj filozofioj.

La temo postulas cerbostreĉon; ĝi ne estas poramuza, pordistra. Sed la traduko estas inda je Lanti, kiu sin montras egale lingvolerta kaj klaresprima en la malfacila medio, kiel en la naiva rakontostilo de "Kandid." La verko de Gille estos legata kun plaĉo de tiuj, kies prihistorian senton ne kontentigas la postuloj de la Marksa Koncepto, sed ĝi devas esti studata ankaŭ de ĉiu E-isto interesata pri la dialektiko de la patro de Eŭropa Socialismo.

Pri metado en E-an ortografion de propraj nomoj ni diru, ke Spensa, Haksli nur tre malprecize redonas Spencer, Huxley. Kont (Comte) povus esti mislegata kiel eraro por la senŝanĝa Kant. Se oni nepre volas E-igi proprajn nomojn, oni almenaŭ atente studi kiel bazon pjn. 88/92 de "La Originala Verkaro de Zam." (Pri la Alfabeto.) Mankas noto pri "sensualism'".

(Robo.)

---

**"The International Good Templar"** contains a regular column in Esperanto, edited by T. Honeyman, 61 Peel St., Partick, Glasgow. Over 1,000 Good Templars in Sweden are members of the Esperanto section.

## KVAKERISMO KAJ PACO.

**Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Bonvole petu per ilustrita poŝtkarto al:—D-ro Fred J. Williams, Samarai, PAPUA.**

**Melbourne Esperanto Club.**—Wednesdays, 8 p.m., Australian Church Hall, Russell-st., Melb. Mr. R. Rawson, 169 Exhibition-st.

**Melbourne Esperanto Society.**—Tuesdays, 8 p.m., Scots Church Hall, 97 Russell-st., Melb. Secretary, Miss L. Irwin, Box 731F, P.O., Elizabeth-st., Melb.

**Coburg Esperanto Club.**—Thursdays, 8 p.m., Labor Hall, Sheffield-st., Coburg. Secretary, Mr. A. Spencer, 48 Munro-st., Coburg.

**Sydney Esperanto Society.**—Thursdays, 8 p.m., 2nd Floor, Manning Bldg., 449 Pitt-st., Sydney. Secretary, Mr. L. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbane Esperanto Society.—2nd and 4th Tuesdays in each month. State Service Union Room, 59a Elizabeth-st. Secretary and president, Mr. L. Parry.**

**Adelaide Esperanto Club.**—Thursdays, 7.45 p.m., Y.M.C.A. Bldg., Hindmarsh Square, Adelaide. Secretary, Mr. F. Droop, 13 Chatsworth-grove, Toorak Gardens.

**Westralian Esperanto Society (Perth).**—Meets every week. Secretary, Mr. D. Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth.

**New Zealand Esperanto Association.**—Headquarters of the international language movement in New Zealand. Patrons: Sir George Fowlds, C.B.E., Auckland, and Prof. J. Macmillan Brown, Christchurch, Chancellor of the New Zealand University. President Mr. W. L. Edmanson; Vice-pres; Mr. C. Brandon, Auckland, Mr. H. E. Facer, Palmerston North, Mr. A. Dewar, Masterton, and Mr. L. A. Efford, Christchurch. Hon. Treas., Mr. E. C. Jack, Wellington; Hon Secretary, Mr. Wm. H. King (Room 106 G.P.O. Blds., Wellington, C.1.). Operations: Propagating Esperanto; arranging annual congresses; conduct of correspondence courses; supplying information etc.

### New Zealand.

**Wellington Esperanto Club.**—Mardoj, 8 p.m., Y.M.C.A., Willis-st., Wellington. Prez., s-ro Vernon Leck; vicprez., f-ino Coralie Smythson, D.B.E.A.; kasisto, s-ro L. E. Dust, D.B.E.A.; sek-io, C. T. Cooch, Box 390, Wellington.

**Auckland Esperanto Society.**—Mondays, 7.30 p.m., New Church Hall, Newton-rd. Communications president, Mr. J. Russell, 2 Pukenui-rd., Epsom.

**En la Estonteco.**

La ĵurnaloj de la estonteco ne plenpakos la kolonojn, raportante pri ŝteloj, drinkadoj, militoj, industriaj disputoj kaj paroloj politikaj. Scienco, Arto, kaj Literaturo prenos ĉefrangon. Nur la paĝojn pure literaturajn oni presigos en la nacia lingvo. La novaĵinformoj presiĝos en la interlingvo. Nuntempe miloj da homoj sentas intereson legi, kion faris aliaj en la kampoj arta kaj scienca, sed estonte milionoj ĝuos aktivan partoprenadon. Ĉi tiuj milionoj avidos informojn pri eltrovaĵoj de homoj laborantaj similfake sur la tuta tero. Landlimoj ne plu baros, kaj izoleco estos for.

La presmehaniko estso forte pliefikigita. Novaĵoj flugos per radio kaj estos literstampitaj sur metalon, per kiu oni povos ilin presi. Neniu linotipmaŝino necesos. La samtempigita rubandmaŝino jam heroldas tiun evoluaĵon.

Per la interlingvo estos eble, sendi ĉiajn novaĵojn al unucentra ricev-stacio, de kiu oni retranssendos ilin ĉien, aŭ al tri, kvar aŭ kvin tiaj stacioj, se oni preferos tion. Okazaĵoj de mondgravo estos sendataj en konciza netformo ne bezonanta reverkon. Malaperos multo de la nune teda subredakta laboro . . . . . .

Ĉiuj sciencaj kaj teknikaj libroj estos verkataj en la interlingvo. Dum intera periodo, antaŭ ol ĉiu plene posedos la helplingvon, kelkaj libroj povos esti presataj en la nacia lingvo de siaj aŭtoroj kaj publikigitaj samtempe kun interlingva traduko. Scienculoj tiel forte bezonas interfakan kunlaboron, ke ili volonte vestos siajn pensojn en la lingvo komuna por iliaj internaciaj kolegoj, simile kiel ili faris kun la Latina. Bazita sur Latino (1) la interlingvo ne estos malfacila por ili.

La interlingvo akcelos sciencan reserĉon kaj pliigi rapidon de internaciaj komunikoj. Oni uzos ĝin por alilandaj korespondo, konferencoj kaj radio . . . . .

Probable post 50 (eble post nur 30) jaroj neniu ŝvitos, lernante la interlingvon. Homoj akiros ĝin en la infanpaŝa aĝo, flank-al-flanke kun la patra lingvo. La lernejoj estos tute dulingvaj. La interlingvo kaj la nacia estos uzataj por instrui la infanojn, kiuj, antaŭ ol ekfrekventi la lernejon, parolos ambaŭ. Por aritmetiko, geometrio, matematiko, astronomio, ĥemio, geografio kaj historio de fremdaj landoj, la interlingvo estos la instruilo; la nacian oni uzos por la literaturo, historio kaj geografio de la propra lando . . . . .

La interlingvo ludos sian parton en la konstruado de la estonta mondo, en kiu ĉiuj popoloj estos unu—popolo kulturriĉa kaj amkora, civilizita super nia nuna konceptipovo, parolanta komunan lingvon kaj ligita de komunaj interesoj—mondo en kiu la militoj de klasoj kaj nacioj estos malaperintaj por ĉiam.

(1) La aŭtorino, S. Pankhurst, estas Interlinguano.

(El la lasta ĉapitro de "Delphos": Kegan, Paul, Londono.)

**In the Future.**

The newspapers of the future will no longer fill their columns with accounts of larceny, intemperence, wars, industrial disputes and speeches of politicians. Science, art and literature will take first place. Only the pages devoted wholly to literature will be printed in the national language. The news will appear in the Interlanguage Where thousands of people are to-day interested in reading of what others have done in art and science, millions will then delight in their actual pursuit. These millions will be eager for news of the discoveries of people engaged in similar activities all over the globe. The frontiers will form no barrier and insularity will be no more.

The mechanism of the Press will be revolutionized. The news will be transmitted by wireless telegraphy, and its impression recorded on metal from which it may be printed. No typesetting machine will be required. The synchronised tape-machine is the precursor of this development.

By using the Interlanguage it will be possible to send all news to one world receiving-station, for transmission everywhere; or to three, four, or five such stations, if preferred. Events of universal importance will be conveyed in concise words that will require no sub-editing. Much of to-day's tedious sub-editing will disappear.

All scientific and technical books will be written in the Interlanguage. During an interim period, before everyone has a familiar knowledge of it, some works may be written in the native tongues of their authors and published simultaneously with an Interlanguage translation. Scientists have such vital need of co-operation that they will gladly clothe their thoughts in the language that will be common to their international fraternity, just as they did of old in Latin. Based on Latin (1), the main vehicle of their existing nomenclature, the Interlanguage will prove no difficult barrier to them.

Interlanguage will accelerate scientific research and increase the speed of international communications. It will be used for foreign correspondence and conferences, and for broadcasting . . . . . .

Probably fifty (perhaps even thirty) years hence, no one will be troubled by learning the Interlanguage. It will be acquired at the toddling age, side by side with the mother tongue.

The schools will be wholly bi-lingual. The Interlanguage and the native language will be used in teaching children, who will enter school with a familiar-speaking knowledge of both. For arithmetic, geometry, mathematics, astronomy, chemistry, the geography and history of foreign countries, the Interlanguage will be the vehicle of instruction, the national language being employed for the literature, history and geography of the native land . . . . . .

The Interlanguage will play its part in the making of the future, in which the peoples of the world shall be one people: a people cultured and kind, and civilised beyond today's conception, speaking a common language, bound by common interests, when the wars of class and of nations shall be no more.

(1) The authoress, S. Pankhurst, is an Interlinguist.

(From the last chapter of "Delphos," Kegan, Paul, London.)

**Psychic Esperanto League.**—Mr. A. W. Thomson, or "Avoto," founder of the Scouts' Esperanto League, is wishful of forming also a body of Esperantist Psychics. A fine letter from him on the subject appeared in the "Psychic News," London, the largest spiritualist newspaper. Any Australian Esp. Psychics are invited to write to him, using his monomark address—BM/Avoto, London, WC1.

Thanks to:—Mr. Barnett, 10/-, June, '35; Mr. Haccou, 5/-, Oct., '34; Miss Hannaford, 4/6, Sept., '35; Auckland Esp. Soc., 5/-, May, '35, (advt.) May, '35; Miss Remington, 4/6, June, '35.

**Esperanto radio lessons** continue from 3LO, Melb., every other Sat. at 6.15 p.m. See programs in the Radio magazines and dailies. Particulars also from R. Rawson, c/o 3LO.

Wholly set up and printed in Australia by the Triumph Press, Surrey Hills, Victoria.